

FINNA ESPERANTISTO

OFICIALA, MONATA ORGANO
de

ESPERANTO-ASOCIO de FINNLANDO

(N:ro 9) Provnumero

DECEMBRO 1907

Jaro 1:a

ABONPREZO:	REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO	ANONCPREZO:
Jare Sm 1: 20 (Fmk 3: —)	ILAREJO ESPERANTISTA	4 sd. (10 pennoj) por ĉiu mil-
1/2-jare 0: 70 (, 1. 75)	HELSINKI FINNLANDO HELSINGFORS	metro. Por 3, 6, 9 aŭ 12 enpresoj,
Unu numero , 0: 10 (, 0: 25)		resp. 10, 15, 20 aŭ 25 0/0-a rabato.

KALEVALA—ESPERANTO.

I.

Ĉiu esperantisto tuj ekvidas, kiel grava estus, ke la ĉefverkoj de la monda literaturo estus esperantigitaj. Kaj duoble dezirinda ja estas ilia esperantigo, kiam ili originale apéris en lingvo malmulte konata. Unu el tiaj verkoj estas Kalevala, nia nacia epopeo. Kiom multaj alilandanoj eĉ scias, ke ekzistas finna epopeo, kiun neŭtralaj kritikistoj kalkulas al la plej altvaloraj spiritaj produktaĵoj de ĉiuj nacioj? Certe tre malmultaj!

Per tradukoj en esperanton profitas kaj la esperantismo, ĉar tiam la lernado de la lingvo fariĝas pli kaj pli utila, kaj la verkoj mem, ĉar tiam la tuta civilizita mondo povos konatiĝi kun ilia idearo. Tradukoj en grandajn kulturlingvojn kompreneble ankaŭ efikas por la laste citita celo, tamen ne kontentige. Oni bezonas multajn tradukojn, kio signifas grandegan laboron; tre malofte oni tamen povas ekhavi ilin tiom multe, ke la verko fariĝu vere internacia, ĉar nune jam ekzistas tre multaj kulturlingvoj. Kaj kompare al esperanto mi kuraĝas aldoni pluan kaŭzon: traduko en naciajn idiomojn ne estas tiom facila kaj prosperema kiom en esperanton. Ankoraŭ estu rimarkigita, ke pro logi-

keco, simpleco kaj neŭtraleco de esperanto oni povas ĝin tralerni, kvankam ĝi estas nenies gepatra lingvo, sed ke male tio estas malfacila koncerne fremdajn naciajn lingvojn. Praktika sekvo de tiu ĉi cirkonstanco estas, ke tradukoj en esperanton ordinare plej bone prosperas, se ili estas farataj el gepatra lingvo; rilate al tradukoj en aliajn lingvojn ĉiu scias, ke ili plejparte estas farataj el fremda en gepatran. Certe la unua alternativo estas la pli favora al tradukoj.

Konvinkita pri vereco de tiuj ĉi opinioj la subskribanto ne povis aprobi la parolon de tiuj, kiuj kredigis, ke ektraduko de Kalevala en esperanton alportus preskaŭ nevenkeblajn malfacilaĵojn. Kaŭzo de tio, ili diris, estas la alegoria kaj figura dirmaniero de Kalevala, kaj ĝia riĉeco de vortoj onomatopoetaj (imitantaj sonojn de naturo). Kompreneble tiu ĉi kaŭzo efikas, ke traduko en esperanton ne povas atingi la tutan belecon de l'originalo, sed aliparte per ĝi neniel povas esti dirita, ke se iam aperos lerta tradukisto, li ne havos ŝancojn bone prosperi. Oni ja scias, ke Kalevala en sia trokea metriko estas tradukita en anglan, germanan, svedan

kaj italan lingvojn. Koncerne tiujn ĉi tradukojn certe je granda parto ekzistas la aludataj malfacilaĵoj, kaj tamen oni laŭdas ilin tre ĝueblaj.

II.

Por doni eĉ malfortan pruvon por suprecititaj opinioj mi aldonas tradukon de kelkaj versoj el Kalevala. Ili estas el enkonduka komenco de l'epopeo kaj tial malpli karakterizaj, sed restu al pli spertaj interesigitoj ilin daŭrigi.

- 1 Animo mia estas ema,
Cerbo mia certe pensas
Nun komenci la kantadon,
Entrepreni recitadon,
- 5 Laŭte la poemojn gentajn
Kaj la familiajn kanti;
Fluiĝas vortoj el buŝ' mia,
Frazoj vigle elfaladas,
Venas sur la langon mian,
- 10 Al la dentoj amasiĝas.
Frato kara, kamarado,
Mia bela kunkreskinto!
Nun komencu kun mi kanti,
Kune rekte recitadi,
- 15 Alian unu renkontinte,
El du direktoj alveninte;
Ni malofte renkontiĝas,
Al la saman lokon venas
En ĉi tiuj limaj landoj,
- 20 Malfavoraj nordaj landoj.
Ni la manojn tuj kunkroĉu
Kaj la fingrojn interligu,
Por ke bonajn kantojn soni
Ni nun lasu, plej bonegajn;
- 25 Tiam aŭdos amikaro,
Lernos ĉiuj karaj gastoj
En generacio juna,
En popolo plu kreskanta
Tiujn memorindajn vortojn
- 30 Kaj poemojn, ricevitajn
De la zon' de Väjnämöjnen,
El forĝej' de Ilmarinen,
De la glava pint' de Kaŭko
Kaj pafark' de Joŭkahajnen,
- 35 De plej postaj Pohja'j agroj
Kaj de kampoj Kalevala'j.

- Ilin kantis patro mia
Dum hakiltenilon tranĉis,
La patrin' lernigis ilin
- 40 Dum ŝpinilon ŝi turnadis,
Dum mi kiel infaneto
Ĉirkaŭ ŝi sur planko vagis,
Kiel ido laktan barbon,
Acidlaktan buŝon havis.
- 45 Vortoj mankis ne al Sampo,
Nek al Louhi sorĉesprimoj:
Kun vortoj maljuniĝis Sampo,
Perdiĝis Louhi kun sorĉaĵoj,
Vipunen ĝis morto kantis,
- 50 Lemminkäinen petoladis.

III.

Mi aldonas kelkajn vortojn pri metriko de Kalevala.

En esperanto efektiviĝas ritmo per tio, ke difinitaj silaboj estas akcentitaj. Ĉar nun la gramatika akcento de iu vorto ne povas esti forlasita, rezultas de tio, ke gramatike akcentita silabo devas ricevi ankaŭ ritman akcenton, t. e. ke ĝi en dusilabaj trokeoj trafas la unuan silabon. Pro tio 4 trokeaj versoj havas en esperanto ecojn, por kiuj ne ĉiuj reguloj de similaj versoj en finna lingvo konvenas. Tiel ekz. ŝajnas, ke oni en esperanto tre bone povas meti ritman akcenton sur unusilaba vorto aŭ sur unua silabo de multsilaba vorto, kvankam tiuj ĉi silaboj laŭ komuna uzo estus „mallongaj“. Modelon de tio donas d:ro Zamenhof mem ekz. en la poemo „Mia penso“:

. . . Ha', kredéble rémemóro . . .
. . . Lá junécon mí ploránta
Métis mém sur lá altáron . . .

Estas ja rimarki, ke en esperanto la longeco de silaboj ne estas tute fiksita, sed dependas iom de bontrovo.

La eco de Kalevala-metriko, ke ĝi permesas pluajn silabojn en komenco de verso ŝajnis esti transportebla ankaŭ en esperantolingvan tradukon: en la supra provo la unua trokeo iafoje konsistas el tri silaboj.

Tre gravaj „beliĝoj“ de nia popol-poezio estas komenca rimo (aliteracio) inter vortoj de unu verso kaj ripeto de sama penso en du versoj. Komenca rimo estas tia, ke en verso almenaŭ du vortoj komencas per sama konsonanto aŭ ambaŭ per vokalo, kaj ke en tiuj ĉi ambaŭ okazoj ankaŭ la unuaj vokaloj

de la vortoj plej ofte estas samaj. Mal-facile oni povas efektiviĝi tion en esperanto, sed nia provo montras, ke tio iafaje prosperis. — La ripeton, pro kiu du (malofte pli multaj) versoj rilate al siaj sencoj apartenas unu al la alia, oni preskaŭ ĉiam povas imiti en esperanto.

A. A. Soia.



LA PAROLADO de D:ro ZAMENHOF

EN LA LONDONA URBODOMO „GUILDHALL“ LA 21:AN de AŬG. 1907.

Estimata Reprezentanto de la Urbo Londono, *karaj samideanoj*, — Estas al mi tre agrable, ke mi havas nun la okazon saluti la Britan popolon en ĝia granda ĉefurbo. Ni venis el Kembrigo, kie niaj Britaj samideanoj kun la plej granda laboremece kaj gastamece preparis por ni belegan feston; ne sole niaj samideanoj, sed ankaŭ la ankoraŭ ne esperantigita urbo faris ĉion, kion ili povis, por ke ni, esperantistoj, elportu el la urbo la plej bonan rememoron. Tial nun miaj unuaj vortoj estas sincera danko por la gastameco, kiun ni ĝuis. Jam la duan fojon ni ĝuas la Britan gastamecon, ĉar certe ja neniu el ni forgesis, kiel amike ni estis akceptitaj en la Britaj urboj Folkestone kaj Dovero antaŭ du jaroj, en la tempo de la Bulonja kongreso.

La ĉambrego, en kiu ni nun troviĝas, havis jam multe da tre gravaj kunvenoj, kaj tie ĉi estis akceptitaj jam multe da tre gravaj gastoj. Nun tiu ĉi sama ĉambrego akceptas la ĉiulandajn reprezentantojn de la mondo esperantista. Kiuj estas tiuj novaj gastoj? Kio estas la afero, kiun ili reprezentas? La esperantismo celas reciproke sinkompre-nadon kaj konsekvence ankaŭ estimon

kaj amon inter ĉiuj gentoj kaj nacioj. Sed tiu celado estas ofte malbone komentariata, kaj sub la influo de agitado de diversaj niaj malamikoj oni ofte kulpigas nin pri celoj, kiujn ni neniam havis. Mi parolos ĉi tie pri du kulpigoj, kiujn ni ofte aŭdas. De diversaj mal-kontentuloj ni ofte aŭdas, ke la demando de lingvo internacia devas esti solvata en alia, pli bona maniero, sed ke ni estas obstinuloj, kiuj volas *nur* Esperanton.

Multajn fojojn mi ripetis, kaj en Bulonjo mi tion ĉi proklamis per oficiala deklaro, ke la esperantismo celas nur al tio, ke ia taŭga kaj vivopova komprenilo inter la popoloj *ekzistu*, sed ke la *formo* de tiu komprenilo estas por ni — aŭ almenaŭ por mi persone — tute indifera: ke se, anstataŭ fari konstantajn kaj senfinajn eksperimentojn kaj teorianton rezonadon, ni decidis elekti la pretan kaj elprovan lingvon Esperanto kaj labori speciale kaj ekskluzive por ĝi kaj fiksi por ĝi netuŝeblan fundamenton — ni faris tion ĉi ne ĉar al ni plaĉas speciale Zamenhof kaj lia verko kaj ne tial, ke li volas esti ia papo, kiel mensoge kredigas diversaj niaj kontraŭuloj — sed nur tial,

ke la esploro kaj sperto montris al ni, ke tia maniero de agado estas la sola, kiu plej certe alkondukos nin al nia celo. Ekzistas personoj, kiuj penante deklini nin de nia vojo, havas la plej bonan kaj plej honestan intencon; ili estas tre sindonaj al nia afero, sed ili pensas, ke se ni faros tiujn plibonigojn, kiujn ĉiu el ili proponas, nia afero iros multe plibone. Pri tiuj personoj ni estas konvinkitaj, ke pli aŭ malpli frue ili komprenos sian eraron; ili komprenos, kiel danĝeraj estas iliaj proponoj en la nuna tempo, kiam ni antaŭ ĉio — bezonas plej severan unuecon, kaj ili pacience laboros kun ni laŭ la voj' elekta ĝis tiu tempo, kiam la estonteco de nia afero estos absolute ekster danĝero. Sed ekzistas aliaj personoj, kiuj laboras simple por detruiri; al tiuj sinjoroj, kiujn nia bele elkreskinta arbo ne lasas dormi kaj kiuj per ĉiuj fortoj penas ĝin subfosi, ni vokas: se vi havas alian vojon, kiu povas nin konduki al nia celo pli bone kaj *pli certe*, montru ĝin al ni, kaj ni ĝin sekvos. Sed vi scias, ke vi proponas ne ion pretan kaj certan, sed nur supozojn kaj teoriajn opiniojn; vi scias, ke la akcepto de via tre duba kaj baldaŭ siavice kritikota plibonaĵo ruinigus la laboron de dudekjara disciplina kaj sukcesa laborado de miloj da personoj kaj nenion kreus anstataŭ ĝi; vi scias, ke se ni dekliniĝus de nia disciplina vojo kaj lasusfali Esperanton, tiam la konfido de la mondo por la ideo mondolingva, konfido fine akirita post centoj kaj miloj da jaroj de nekredado, pereus por ĉiam kaj jam neniam povus esti reakirita; vi ĉion scias, kaj tamen vi per ĉiuj fortoj penas senkreditigi nin en la okuloj de la mondo. Bone, daŭrigu do vian Herostratan laboradon, kaj ni iros trankvile nian vojon.

La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj,

kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas el malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! Dum la pseŭdo-patriotismo, t. e. la penta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantismon, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni la ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo—tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo“, ĉar en via buŝo la sankta vorto „amo“ malpuriga.

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi alestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj—aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigar-

dataj kiel fremduloj aŭ sklavoj! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la

patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata estas „esperantistoj“.



PRI ĜSPERANTISTA FESTOTAGO.

De profesoro Otto Simon (en Vieno) sekretario de la komitato, starigita por elekti kaj proponi daton por la tutmonda festotago, ni ricevis la jenan raporton:

Vieno, la 22:an de Novembro 1907.

Plenumante la decidon de la Tria Kongreso, D:ro Zamenhof elektis komitaton de sep membroj por proponi daton por la tutmonda festotago, principe jam akceptita de la kongreso. Jen la provizoraj proponoj de la komitatanoj:

Nia Majstro proponas:

a) la daton de 17:a de Decembro (dato de la unua festo esperantista en la jaro 1878);

b) la tagon de la printempa (por la suda hemisfero: aŭtuna) tagnoktegaleco, kiu povus servi kiel simbolo al la neŭtraleco por la tuta homaro.

La Majstro aldonas, ke tiu provizora opinio ne havu ian influon ĉe la decido.

Al la dato de la 17:a de Decembro aliĝas Sinjoroj *Codorniu* kaj *Pollen*; al la dato de la 21:a de Marto Sinjoroj *Montrosier* kaj *Simon*. Sinjorino *Hankel*

timas ke tiuj datoj estus tro proksimaj al la kristnaska respektive kelkafoje al la Paska festo. Ŝi kaj Sinjoro *Tabenski* de nove proponas la 21:an de Julio. Tiun daton S:ro Tabenski jam antaŭ kelkaj monatoj proponis en „Tra la Mondo“, kiel festotagon de la dudeka jubileo de la momento, „Kiam nia Majstro transiris la Rubikon“, kaj efektive multaj Esperantistoj festis tiun daton. Nia Majstro aldonas ke laŭ lastaj esploroj, faritaj de li mem, montriĝis ke:

1) La dato en kiu la unua libro pri Esperanto ricevis la cenzuran permeson, estis ne la 21:a de Julio, sed la 2:a de Junio (= 21:a de Majo laŭ rusa kalendaro);

2) El ĉiuj aliaj datoj koncernantaj la komencan historion de Esperanto, kun plena precizeco estas konata nur la dato de la 17:a de Decembro 1878.

En la nomo de la komitato, kies sekretario mi estas, mi havas nun la honoron, peti la esperantistan gazetaron, ke ĝi bonvole represu tiun raporton kaj invitu iliajn legantojn, sendi al mi kiel eble plej baldaŭ iliajn opiniojn. El tiuj

leteroj ricevotaj mi faros raporton por la komitatanoj, kiuj poste voĉdonos definitive. La Kvara Kongreso estos petata je ĝia lasta sankcio.

Kun esperantista saluto,
Otto Simon.


Wien, VIII. Josefstädterstrasse N:o 66.
Austrujo.

La nomita komitato konsistas el la jenaj personoj: S:ro D:ro Zamenhof (Varsovio), S:ro Capé Montrosier (Orleans), S:ro Codorniu (Murcia), Sinjorino Hankel (Dresden), S:ro Kolonelo Pollen

(London), S:ro Otto Simon (Wien) kaj S:ro Tabenski (Ejszyszki apud Vilno).

Ni do insiste admonas niajn finnajn legantojn kiel eble blej baldaŭ ensendi al profesoro Otto Simon sian opinion pri la dato de la festotago.

Ni de nia parto proponas la daton de la printempa tagnoktegaleco, kiel la plej taŭga de la datoj proponitaj. Dezirinde estas ke tiu dato estu elektita, kiel ankaŭ ke la decido baldaŭ okazu por ke ni jam dum la venonta printempo povu inde soleni la 21:an Jubileon de Esperanto.



IV. INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO DRESDEN 16—22 AUGUSTO 1908.

UNUA CIRKULERO DE LA KVARO POR LA KVARA.

„Apenaŭ la lasta brilo de la glora tria kongreso estingiĝis, kaj jam la unuaj radioj de la kvara estas videblaj. La gesamideanoj jam scias, ke en Kembriĝ' Germanujo invitis la Esperantistaron; la urbo restis ankoraŭ nedefinita. Nun Germanujo, en harmonio kun la Centra Organiza Komitato kaj kun la konsento de D:ro Zamenhof elektis Dresden kiel la plej taŭgan urbon.

La bela saksa ĉefurbo havas tre oportunan situacion. Ĝi nek estas nordgermana nek suda urbo, ĝuste en bona mezo de Germanujo ĝi kuŝas, facile atingebla por ĉiuj landoj. La Kvaro, kiu aranĝos la kongreson, estas: D:ro Mybs, D:ro Schramm, S:ino Hankel kaj S:ro Arnhold. Tiu-ĉi kvaro ĉion faros, por faciligi al la kongresantoj la vojaĝon kaj la loĝadon. La Societo por la Interkomunikiĝo de la Fremduloj (Fremdenverkehrsverein) tre afable proponis al la kvaro sian helpon; per kunagado

kun tiu-ĉi Societo la kvaro aranĝos mal-karan restadon al niaj gastoj. Kun kora gastemeco ni ilin atendas, entuziasme ni ilin akceptos! La malnovaj amikoj revidos unu la aliajn, novaj ligoj fariĝos, pli intime la granda familio unuiĝos. — En la lando de la scienco tre granda ekspozicio montros la riĉan literaturon de nia lingvo.

Post la kongreso ekskursoj tra Germanujo estos aranĝotaj, ni esperas, ke multaj Esperantistoj partoprenos. Tiuj el ili, kiuj preferas la viziton kaj restadon en trankvila „Esperanta Vilaĝo“, trovos en Weisser Hirsch la deziratan ĉarman lokon, veran Esperantistujon. Jam nun oni tie aranĝis kursojn.

La sukceso de niaj entreprenoj dependas de la multnombra apero de la gesamideanoj. Ĉiuj nacioj estu bone reprezentotaj! Ni petas, ke oni baldaŭ anoncu sian nomon kaj profesion klare skribitan, kun detala adreso al la *Oficejo*

de la kvara, kiu restos ĝis la definitiva translokiĝo al Dresden (en komenco de somero 1908) ĉe la Prezidanto D:ro Mybs, Altona a. E., Marktstr. 68. Ankaŭ ne forgesu la donacan kason kaj la Garantian fondaĵon, ĉar ni bezonas multe da mono. Ni do petas, ke oni sendu ĉiujn monojn al la bankejo Fratoj Arnhold (Gebr. Arnhold) Dresden, Waisenhausstrasse 20.

La Kvaro por la Kvara.

D:ro Mybs. D:ro Schramm.

Marie Hankel. H. Arnhold.*

Energie, fervore „la Kvaro por la Kvara“ jam nun laboradas por prepari gloran sukceson al nia kvara kongreso. Niaj germanaj samideanoj kaj precipe la Dresdena amikaro sin preparas por akcepti siajn amikojn el ĉiuj partoj de l'mondo, kiuj venontan someron vizitos ilian befan landon kaj urbon. Ni certe povas fidi je la organizantoj! Ĉio estos bone aranĝita. Kaj la „Kvara“ denove alportos al nia afero gravan sukceson kaj plian internan fortiĝon-

La „Verein zur Förderung Dresdens und des Fremdenverkehrs“ („Unuiĝo por la bono de Dresden kaj la plimultigo de la vizitantoj“) proponis sian helpon al la Organiza Komitato. La poliestro de la urbo sendis 20 policianojn al la kursoj por lerni Esperanton. Ho-


telistoj kaj komercistoj multnombre vizitadas la kursojn.

Laŭ propono de S:ro Michaux (Boulogne) la Kvaro ĉiumonate publikigas liston de partoprenantoj, kiuj jam nun anoncis sian ĉeeston en la kongreso. La 4:a listo aperis en komenco de Decembro kaj laŭ ĝi la nombro de la kongresantoj jam estas ĉirkaŭ 330. Bela komenco!

Novajo por tiu ĉi kongreso estos la starigo de „Esperanta Vilaĝo“ proksime de la Kongresurbo. La ĉarma urbeto „Weisser Hirsch“ (Blanka Cervo) estas tutmonde konata kiel saniga loko kaj ĉiusomere vizitata de multaj miloj da homoj. La venontan someron la plimulto de ili plej kredeble estos verdsteluloj. Esperanta kurso jam estas tie malfermita kaj baldaŭ fondiĝos grupo.

La Kvaro eldonis bele ilustritan invitpoŝtkarton por la kongreso. La bildo prezentas vidajon de Dresden, kies konturojn ni vidas tra fenestro de fervoja vagonaro, ĵus pasanta la ponton super „Elbe“. La karton havas surskribon: „Venu Dresdenon! Koran bonvenon“. La prezo de la poŝtkarto (ricevebla ĉe S:ro Referendaro Arnhold, Dresden-Altstadt, Waisenhausstrasse 20) estas: 1 ekz. 10 pfen., 50 ekz. 3 markojn, 100 ekz. 5 markojn. Finnaj samideanoj ĝin povas ricevi ĉe „Ilarejo“ je prezo po 10 pennoj.

A Somo.



ESPERANTO EN FINNLANDO.

Helsingfors. La societo „La Polusstelo“ dum la pasinta aŭtuno kunvenis ĉiu vendrede en ĝia sidejo Norda Esplanada strato 39, je la 8:a h. vespere. Regule ĉeestis 15—20 anoj. Post la oficiala parto de la programo, nome:

aprobo de la protokolo kaj diskutado pri aferoj koncernantaj la esperantismon, oni pasigis la horojn aŭ libere interparolante por perfektigi en la buŝa uzado de nia bela lingvo, aŭ kune korektante la tradukojn, kiujn ĉiu ĉeestanto hejme faris

el la bela rakonto „Donaco de la Marreĝo“ (svede: Hafskonungens gåfva; finne: Merenkuninkaan lahja) de Z. Topelius. Por ĉiu tria kunveno estis elektita programkomitato. Tiujn ĉi vesperojn ni aŭdis paroladojn, i. a. de S:ro W. Anttila pri la maniero de Prof. Bruggmann kaj Leskien prijuĝi artajn lingvojn tutmondajn, cetere deklamadojn, amuzajn rakontetojn kaj kantadojn.

En Oktobro la ordinara sekretario de l'societo, S:ro A. Sandström pro malsano kaj troa laboro estis devigata ekŝiĝi. Kiel helpantan sekretarion ĝis la fino de l' jaro oni elektis S:ron E. Välikangas.

En komenco de Oktobro la societo malfermis du Esperantajn kursojn, apartan por finn- kaj svedlingvuloj. En la unuan enskribiĝis 18 gelnantoj kaj en la duan 14. Instruistoj estis S:ro D:ro Hj. J. Runeberg, en sveda, kaj S:ro A. A. Sola en finna kurso, kiuj ambaŭ okazis ĉiu sabate je la 8:a h. vespere en la Universitato.

La socialista partio en nia ĉefurbo fondis propran lernejon por siaj infanoj. Nur du lingvoj estas instruataj tie nome la gepatra lingvo, en tiu ĉi okazo la finna, kaj Esperanto. Jen sekvinda ekzemplo.

Esperanto ankaŭ estas instruata ĉe la vesperkursoj, kiujn faras la studentoj al laboristoj.

En la ĉiteia industria lernejo nia lingvo ankaŭ ricevis multajn amikojn. Tie fervore propagandas nia bona samideano S:ro Urho Rautiainen, sub kies kondukado jam ĉiuj lernantoj (pli ol 30) en la meĥanika sekcio fariĝis esperantistoj. Ankaŭ en la konstruista sekcio multaj lernantoj ekkomencis sin interesi pri nia afero.

*

En Tampere (Tammerfors) la esperantista movado ne tre rapide, sed per firmaj paŝoj iras antaŭen. En la komenco de Septembro la klubo malfermis du

lingvokursojn. Tiufoje la partoprenantaro ne estas tiel granda kiel lastaŭtune, sed ili estas seriozaj kaj laboras sukcese. Kiel fervore oni nuntempe akceptas la ideon de lingvo internacia, tion montras la ekzemplo de unu el niaj kursaninoj, kiu regule ĉeestas la kursojn kaj iam eĉ aliajn kunvenojn, kvankam ŝi loĝas en la kamparo kaj nur fervoje povas veni la urbon.

La 24:an de Novembro la klubo aprobis proponon por ŝanĝota regularo, laŭ kiu ĝi de proksima Novjaro aliĝos al la Esperanto-Asocio de Finnlando, kaj de tiu templimo sin nomos „Grupo Esperantista de Tampere“. La alia pli grava ŝanĝo koncernas la aniĝon. Ĝis nun ĉiu kursano estas rigardata kiel klubano. Sed pro tio la nomaro de la klubo enhavas tro multe da nomoj, kies posedantoj, ne havante la obstinon kaj la paciencon bezonatajn, post du aŭ tri vesperoj ne plu estas vidataj en la esperantokunvenoj. Ili ja ne estas veraj klubanoj, kvankam iliaj nomoj fantomas en niaj paperoj. Laŭ la nova regularo la kursanoj, se ili ne aliĝas al la grupo, kio estas ebla per montro de ecoj esperantistaj kaj per pago de la jara kotizaĵo.

La Delmas'aj murbildoj montriĝis tre praktika helpo en la studado de nia lingvo. Ili donis fortan antaŭenpuŝon al la kursaj klopodoj. Se nur estus ia ekzameno de kapableco kun atesto ĝin sekvanta, eble ĝi incitus multajn lernantojn, kiuj nun tro frue laciĝas, paciencie persisti.

K. J. S.

*

En Kymenlaakso, la plej densa kaj rimarkinda fabrikloko en Finnlando, troviĝas multaj favoruloj por Esperanto, eĉ inter laboristoj, sed la manko de instruantoj malhelpas la legadon. Multaj proprigas al si la gramatikon tamen nepovante ekkomenci la legadon sen bezonaj konsiloj kaj sen kamaradoj interesiĝintaj je la sama afero. La klubo esp.

en Karhula intencis jam dum la pasinta semajno aranĝi kurson en Esperanto, sed je okazinta kaŭzo, ĝi devis prokrasti ĝin ĝis la venonta legsezono.

La komerckomiza klubo en Kotka, komencinte vesperkurson en multaj temoj akceptis ankaŭ Esperanton kiel studaĵo. La legado de Esperanto komencis la 29-an de sept. kun parolado pri Esperanto kaj kun malgranda esperanta ekspozicio ornamita per portreto de dr. Zamenhof. La kurso, kiu daŭros la tutan vintron kun unu vespero ĉiusemajne estas vizitata de ĉ. 30 gelernantoj. En instruado la berliza metodo kaj gramatiko estas uzataj paralele.

H. S.

*

Kemi. Ankaŭ en tiu ĉi norda urbeto nia afero konstante kaj certe progresadas. Ni ricevis de tie jenajn sciigojn:

„Dimanĉon la 1-an de Decembro komencis kursoj Esperantistaj de Laborista Societo en Kemi. Tuj enskribiĝis multe da lernantoj. Kiel Instruisto agas S:ro K. P. Lahdenperä, vicprezidanto de „Norda Lumo“.

„Vivu, kresku kaj floru la verda standardo“!

Samideano.“

*

Savonlinna (Nyslott). »Fajrero« klubo esperantista en la liceo de Savonlinna.

Jam antaŭ kelkaj semajnoj mi plezure sciiĝis, ke „Fajrero“, la malgranda klubo esperantista de la liceoj en Savonlinna, ankoraŭ agadas. Poste petinte pluajn sciigojn, mi ricevis de unu faj-


rerano leteron, en kiu li skribas interalie:

„Fajrero“ vivas ankoraŭ, kvankam ni pli frue dum la aŭtuno jam kredis, ke ĝi nepre mortos, ĉar multe da malnovaj fervoraj membroj disiĝis el la klubo, aŭ fariĝis pasivaj. Sed kun finna obstineco ni provis, eĉ per malgrandaj fortoj, penadi antaŭen. Nun ree aliĝis al „Fajrero“ multe da novaj anoj, kiuj fervore vizitas ĉiun kunvenon. Ĝis nun ni regule kunvenis je intertempoj dusemajnaj por kune lerni Esperanton kaj subteni nian intereson por ĝi. Kiel prezidanto funkcias ankoraŭ d:ro Kallio, kiu donas en ĉiu kunveno lecionojn en Esperanto al la novaj — kaj ankaŭ al la malnovaj — membroj. Krom tio estas en la programo ordinare ankaŭ rakontoj, antaŭlegoj, deklamo t. k. p. Plezurige ni kune pasigas la vesperon, kaj la intereso ĉiam pli kaj pli kreskadas. Kaj mi esperas, ke tiu ĉi intereso por Esperanto ne malfortiĝu ĉi tie, kiel ankaŭ ne aliloke.

Kiel ni vidas, niaj samideanoj en Savonlinna ankoraŭ batalas, laŭ siaj fortoj, por nia komuna afero. Tio ĉi estas des pli ĝojiga, ĉar mi komprenas, ke la fajreranoj por siaj lernejoj laboroj povas oferi nur malmulte da tempo por Esperanto. Al ili kaj al ĉiuj esperantistoj mi tamen diras:

„Obstine antaŭen!
La nepoj nin benos,
Se ni pacience eltenos“.

E. Vokoso.



ESPERANTO CE LA KOMERCISTOJ.

La Esperantista Grupo Pariza, sekcio Industria kaj Komerca, antaŭ nelonge publikigis la jenan cirkuleron, kiun ni

rekomendas al atenta tralegado de niaj legantoj komercistoj:

„Estimata samideano, Ni opinias, ke

alvenis la tempo por ĉiuj Esperantistoj uzi Esperanton en siaj internaciaj korespondado kaj interrilatoj, ĉar per tia uzado ili men ricevos ofte ne nur tre grandan profiton, sed ankaŭ faros tre fruktoportan kaj utilan servon al la disvastigo de nja kara lingvo.

Ĝis nun oni povis timi, ke letero esperante skribita kaj sendita al neesperantisto, estos nekomprenebla de la adresato pro tio ke li eble konas nek nian lingvon, nek esperantiston, kiu povos traduki al li la enhavon. Sed en la lastaj jaroj, la Esperantistoj fariĝis pli kaj pli multenombraj kaj tio ebligis al la Komerca Sekcio de la esperantista Pariza Grupo starigi en tuta Francujo vastan organizadon de letertradukado, kies funkciadon ni klarigas ĉi malsupre.

Ni tre instigas vin diskonigi ĉi tiun organizadon al la membroj de via Grupo aŭ Societo ĉu per sendo de apartaj cirkuleroj, ĉu per disdonado de la sekvanta listo de la franca tradukistaro.

Notu bone la jenajn rekomendojn pri la funkciado de tiu letertradukado.

Kiam nefranca Esperantisto volos korespondadi esperante kun iu ajn persono loĝanta en Francujo, kiu ne konas mem Esperanton, li devas unue certigi en kiu departemento kuŝas la urbo de la adresato (departemento estas ĝenerale skribita post nomo de urbo). Ekz: Paris (Seine), Marseille (Beuches-du-

Rhône), Boulogne (Pas-de-Calais).

Poste li devos serĉi sur la listo de franca tradukistaro tiun departementon kaj kopii sur unu tradukigilo, la nomon kaj adreson kiuj estas skribitaj post la nomo de tiu departemento, kaj enmeti la tradukigilon en la koverton samtempe kun sia letero.

Por tiu letertradukado, la adresato devos pagi al la tradukanto 50 centimojn per poŝtmarkoj.


Pro tio, ke la poŝtmarkoj de ĉiuj landoj estos akceptataj, la adresanto, kiam li volos ŝparigi tiun elspezon al sia korespondanto, povos enmeti en la leteron poŝtmarkojn de sia lando. 50 centimoj = 40 pfenigoj = 5 pencoj.

Por ĉiaj sciigoj, sin turni al la Komerca kaj industria sekcio de la grupo Pariza. Adreso: Esperanto, 21, Rue de l'Arbre-Sec, Paris"

Al komercistoj, kiuj tion deziras estos sendata la jena franclingva tradukigilo:

Monsieur. N'ayant pas l'avantage de connaître la langue française, je prends la liberté de vous écrire en Espéranto.

Pour faire traduire la lettre ci-jointe il vous suffira de l'envoyer à l'adresse ci-dessous en joignant 0 fr. 50 en timbres-poste français ou étrangers. Adresse du Traducteur (Adreso de la Tradukonto). kune kun adresoj de pli ol 80 tradukistoj, unu aŭ du por ĉiu franca departemento.



LA KONKURSOJ DE „LA REVUO“.

Dank' al la granda sukceso de la literatura konkurso, kiun organizis „La Revuo“ la lastan jaron inter siaj legantoj, la direkto de la nomita gazeto decidis tiun ĉi jaron ĉiumonate malfermi konkursojn en diversaj kampoj. Tiel ne nur literaturistoj, sed ĉiuj legantoj povos partopreni en ili.

En la 3:a (novembra) n-ro estas malfermita

la 1:a konkurso

de la dua jaro.

Verkita devas esti, en plej bonstila literatura formo, fino al la rakonto de Frank R. Stockton: „Ĉu la virgulino

aŭ la tigro», kiu troviĝas en la 2:a (okt.) n:ro de la gazeto.

Detalajn sciigojn pri la konkurso, kiel ankaŭ la konkurso markon oni trovos en la 3:a n:ro de l' gazeto. La manuskriptoj devas esti alvenintaj al la direkcio antaŭ la 1:a de marto 1908. Por la premioj estas difinita 125 frankoj.

En la 4:a (dec.) n:ro „La Revuo“ malfermas.

la 2:an konkurson


de la dua jaro.

Ĝi celas difini per voĉdonado, kiu nuntempe, post nia Majstro, estas la

plej lerta verkisto aŭ tradukisto en Esperanto; kiu estas lia plej bona verko; kaj fine oni devas diveni kiom da personoj partoprenos en la konkurso. Grandaj premioj estos disdonataj. Pliaj sciigoj troviĝas en la 4:a numero de la gazeto.

Finnaj Esperantistoj, rapidu havigi al vi „La Revuon“! Abonu ĝin kaj partoprenu en la konkursoj!

En Finnlando oni abonas „La Revuon“ ĉe „Ilarejo Esperantista“. Abonprezo por jaro Fmk. 7: — aŭ ponumere 75 pennoj.



L'ABSTINENCA MOVADO KAJ LA LINGVO INTERNACIA.


„Cambridge Daily News,“ kiu tiel aminde servis al la kongresanoj dum la III:a universala kongreso de Esperanto en Kembriĝo, enhavis la 16:an de nov. artikolon pri „la unua malpermesa leĝo de alkoholaĵoj en Eŭropo“. En artikolo nia malpermesa leĝo estas laŭafere pritraktata kontraŭ tiuj transsendataj de niaj drinkejmastroj. Antaŭ la artikolo estas antaŭparolo skribita de

sinjoro Smouth rimarkigante pri la valoro de Esperanto inter la samideanoj de specialaj movadoj.

Dum la universala kongreso okazis, kiel sciante, ankaŭ kunsido de la sobreculoj inter kiuj estis vidataj multaj eminentuloj el diversaj landoj.

Ĉu oni scias pli bonan rimedon disvastigi novajn ideojn en la tutan mondon ol la internacia lingvo.

H. S.



NE FORGESU

reaboni „Finnan Esperantiston“ por la jaro 1908.

Abonprezo, en la plej proksima poŝtoŭficejo aŭ ĉe la administracio:

por 1/1-jaro . . . Fmk. 3: —

por 1/2-jaro . . . „ 1: 75

ke ĉiu nuna abonanto de „Finna Esperantisto“ devas varbi almenaŭ 1 novan abonanton por la sekvanta jaro por ke la gazeto povu regule eliri

Manuskriptoj, alvenintaj al la redakcio post la 5:a estos enpresataj nur en la numeron de la sekvanta monato. Ĉiam skribu tre legeble kaj nur sur unu flanko de la papero.

Helsingissä „Finna Esperantisto“ tilataan postitoimistossa, O. V. Laurent & C:o'in sanomalehtimyymälässä, Pohjois Espl. k. 35, tahi lehden toimistossa, Kauppiaank. 11.

I Helsingfors kan „Finna Esperantisto“ prenumereras å postkontoret, uti O. V. Laurent & C:o's tidningsdepot N. Espl. 35, eller å tidningens byrå, Köpmansgatan 11.

ANONCOJ.

FINNAJ ESPERANTISTOJ!

ATENTU!

Ĵus aperis:

Esperanto-avain

Ricevebla ĉe „Ilarejo“.

Prezo po 5 pennoj (afr. 10 p.); 10 ekz. afr. 60 p.; 25 ekz. afr. Fmk. 1:30; 50 ekz. afr. Fmk. 2:50; 100 ekz. afr. Fmk. 4:85.

Hospits

Kristana loĝejo por vojaĝantoj.

HELSINKI — VUORIK. 17.

— Telefono 34 24. —

Plej bona kristnaska donaco al Esperantistoj estas la poŝhorloĝo „l'Espero“. La prezo de la poŝhorloĝoj, senditaj al hejmo, estas nun po 26 markoj, pli frue po 30 m. Abonante la poŝhorloĝon de ni, vi ricevos ĝin plej rapide kaj je la sama prezo, kiel abonantoj de „Tra la Mondo“.

Kelloseppä W. & O. Kinos.

Tampere
Kortelahdenkatu 12.

Finnaj Esperantistoj!

Ĉiujn poŝtkartojn tuj respondos

Marshall White
224 Water Street
Evansville, Indiana U. S. A.

Georg Davidov,

Russie-Saratov, kesto 12

pagas altan prezon por la jenaj presaĵoj:

Libroj: N:oj 13, 22, 23, 25, 28, 32, 34, 35, 39, 40, 49, 55, 57, 66, 68, 69, 96, 97, 98, 99, 100.

„Esperanto“ eld. en Santander, ĉiuj n:roj aŭ apartaj.

„Monata Revuo Esperant.“ eld. en Södertelge, ĉiuj n:roj aŭ apartaj.

„Esperantisto“ por jaroj 1889, 1890, 1891.

„La Pioniro“ eld. en India, N:oj 1, 2, 4.

Se vi volas

pruvi, ke vi estas vera esperantisto,
uzu do

Esperantistan Poŝkalendaron

por 1908.

Ricevebla ĉe „Ilarejo“.

Prezo: Fmk. 1:20 a frankite.



Ciuj gazetoj esperantistaj
estas aboneblaj ce Ilarejo
Esperantista

HELSINKI — HELSINGFORS.

